Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 8-a de Januaro 2018

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Asaf Ĥefec, Dror Gaon, Eran Vodevoz, Matilda Landaŭ, Gabi Zeevi. **Gastoj:** Miĥal, Lea

Protokolo de la antaŭa kunsido (8-a de januaro 2018) – publikigita en la retejo.

1. Raportoj (Amri):

a) Vizito de Mara Rockliff, fama esperantistino, dum 18-25/3/2018. En la jerusalema grupo je 22.3? Ŝi havos liberan posttagmezon en TA je 25.3, ĝojos renkonti E-istojn.
b) Nova subvenci-peto por la filmo pri Zamenhof. La reĝisoro Zaki Schiff verkis novan subvencipeton pri lingvoj kaj Zamenhof.
c) Kontaktoj kun la Pola Instituto (ekspozicio, libro Z, filmo Z). Nia ligantino en la instituto, Avigail, diris, ke ne ekestos la ekspozicio, ĉar ŝanĝiĝis la direktoro. Sed pri la libro pri Zamenhof kaj pri la filmo ŝi entuziasmiĝis, parolis pri traduko de la libro el la pola al la hebrea. Amri skribis (angle) al la nova gvidantaro. [la postan tagon ili respondis kunlaboreme, pri la ekspozicio eblas dum 2018, sed pri la libro momente mankas respondeculo kiu plenums la rolon de Aviagail. Pri la filmo ili proponis renkontiĝi ku Zaki].
ĉ) "Fajreroj" (4-prelegaj lernejaj kursetoj): Eran sukcesis en Givataim, Amri ekprovos en Modiin kaj Jerusalemo.
d) Pago kaj kompenco por la ĉemizoj: la diferenco inter “blankaj” kaj “grizaj” preskaŭ ne ekzistas. Amri postulis de la provizantoj rekompenci per 10 pliaj koloraj ĉemizoj. Se ili faros – ili ricevos nian pagon, kiun ili ankoraŭ ne ricevis.
e) Israel Rosenthal (Jehoŝua) – kontaktis nin nekonata iama esperantisto, 85 jara, en Haifa. Li lernis E-on antaŭ longa tempo, sed ne aktivis jam multajn jarojn. Li pensas partopreni en la venonta IK en Akko. [Sekve li mendis la vortarojn de Murĵan.]

2. Esperanto-kurso en Tel-Avivo - (Amri)

a) Avigail provis kontakti kun la urbodomo pri la afiŝoj, - sed cedis...
b) Joela nomis du eblecojn por senpaga reklamado; ĉu estas aliaj? Doron pretas reklami por certa sumo: 500 sikloj, aldone al lia instruista rekompenco (7000 sikloj). *unuanime akceptita!*
c) Amri reklamos per FB.
ĉ) Datoj: la kurso havos supozeble 15 lecionojn. Do, ni devos komenci je la 5/3, sed pro la estrarkunsido preferable je la 12/3 – por ke la kurso finiĝu antaŭ la somero.

3. Problemo de Yagil, kaj ligitaj aspektoj

Jagil minacas "denunci" la Asocion ĉe la Administranto de la Asocioj (רשם העמותות). Kvankam li ne povas fari tion oficiale (la leĝe bezoanta kvorumo estas kvarono de la membroj), li povas damaĝi, kaŭzi suspektojn kaj kontrolojn. Por rebati tian ev-an denuncon la estraro aŭskultis atestojn pri liaj stilo kaj sinteno – en Tapuz kajla Klubejo. Eblas bloki lin ("ban") en ELI-listo. La Estraro pridiskutis la temon el pluraj vidpunktoj, inkluzive la juran. ../2

Kvankam li ankoraŭ ne pagis la ĉi-jaran membro-kotizon, la 5an de marto (nur) li povos prezenti siajn asertojn kaj kritikojn en la klubo.

4. La 18-a IK en Akko 3-5 de majo, 2018 (Amri)

a) Aliĝilo (far Jehoŝua) preta en la reto, Jael Ŝelaĥ kolektos la respondojn. Ĝis la fino de februaro oni devas registiĝi, ĝis la 15/3 ni povas nuligi senpage.
b) Buĝeto: espereble estos ekvilibra [pago por Ĵomart kaj Nataŝa: 1000 eŭroj por la flugo + 750 NIS por la gastejo, antaŭvidita nombro de partoprenantoj: 40-50, po 100 NIS por la programo].
c) Anonco en Revuo Esperanto: aperos en la revuo E-o nur en la marta n-ro (rete jam meze de februaro). Sur 8-ona paĝo, dorskovrile, kostos 165 eŭrojn. Voĉdono: *unuanime akceptita!*
ĉ) Eksterlandanoj - artistoj (Ĵomart kaj Nataŝa) kaj interesiĝantoj: la artistoj aliĝos al la AK-PK, plenkotize Post la novjara reklamo de Amri estis enteresiĝoj ankaŭ far de aliaj.
d) Antaŭ- kaj Post-IK-aj ekskursoj: estos nur unutaga AK en Nazareto [ĵaŭde matene?]. La PK inkludos ankaŭ Jerusalemon, krom la Sudon kaj Petra.
e) Marta Otto informis ke ŝi ne venos. Kiu gvidos ĉe la Bahaaj ĝardenoj? kaj kiam? Jehoŝua: Eblas aŭ vendrede aŭ sabate. Amri: prefere vendrede, ĉar tiel ni povos atingi Haifa buse aŭ trajne; la alia ekskursa tago (Akko) estas pieda.

5. Israela E-isto (Amri)

a) Aperos duobla n-ro: Vintro 2017/Printempo 2018
b) Mikaelo - ĉu kunredaktu la n-ron vintro 2018? (la nun-redaktata duobla n-ro jam estas preskaŭ preta).

6. 20-a IK en Eilat, 2019

a) Ĉu inviti ankaŭ la alian duonon de Kajto? – Ili estas 4 personoj, ili disiĝis kaj lastatempe foje reaperas kun, kiel en la UK-oj en Lillo aŭ kaj Seulo kaj la ĵusa NR. Ni ne povas decidi ankoraŭ, ĉar ni ne konas la supozeblan buĝeton. Cetere, por 2019 ni eble invitu Jomo.
b) Eksterlandaj interesiĝantoj – ekzistas jam, post la propagando de Amri. Ni vidu post la apero de nia reklamo en la bulteno E-o.
c) Hoteloj en Eilat kaj Akaba: en Eilat ni trovis unu, en la sudo de la urbo, kun tre bonaj kondiĉoj. En Akaba ankoraŭ ne – mankas lokaj kunlaborantoj.
ĉ) Nova informilo: estas jam en la retejo (Dror).
d) Reklamado: aperos anonco en revuo Esperanto, kune kun Akko (*vidu supre*)

7. Financoj, oficejo (Ŝlomo) - *venontfoje*.

Intertempe Ŝlomo disdonis la printitan buĝeton por la 2018-a jaro.

La venonta kunsido: la 5-a de Marto, 2018, 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi